

CxEA-retkomunikoj 5/2006

CxEA-RETKOMUNIKOJ estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por cxuiuj rete atingeblaj CxEA-membroj, sed ankaux senpage sendata al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne deziras ricevadi ilin, sufcixas via mesagxo kun la teksto "Nesendadu" en la temlinio al <chrdle@kava-pech.cz> kaj ni tuj eligos vian retadreson el la dissendolisto.

ENHAVO

1. CxEA-konferenco malantaux la pordo
2. Invito al Dobřichovice: diverskiale
3. Invito al Svitavy
4. KAEST - randevuo de fakuloj
5. Expolingua kaj Esperanto
6. Alvoko al la organizantoj de E-eventoj

1. CxEA-konferenco malantaux la pordo

La konferenco de Cxehxa Esperanto-Asocio, kiu okazos cxisemajnfine en České Budějovice, okazos sub auxspicioj de la cxefurbestro Miroslav Tetter. Gxis nun aligxis plki ol 90 partoprenontoj inkluzive kelkaj de eksterlande. Bedauxrinde ne plu eblas disponigi por pliaj aligxintoj tranoktojn, nek komunajn mangxojn.

2. Invito al Dobřichovice: diverskiale

la semajno inter la 2-a kaj la 8-a de oktobro estos en Dobřichovice plena de Esperanto: 1. la tutan semajnon okazos Internacia Paroliga Semajno, kiu konsistas el cxe-metoda kurso de Esperanto por komencintoj sub gvido de Stano Marček (SK), meza konvcersacia seminario sub la gvido de Petro Chrdle (CZ) kaj la supera seminario por la fluparolantoj sub la gvido de Albrecht Kronenberger. Pliaj informoj cxe <http://www.kava-pech.cz/inpasem>. Tamen sciu, ke restas nur lastaj du lokoj por tranokto (unu por viro, unu por virino), neniuj libera cxambroj. Sed al interesatoj ni strebos helpi kun tranokto en proksimeco. 2. inter la 6-a kaj la 8-a de oktobro okazos samloke internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA. Gxis nun aligxis 4 kandidatoj (3 CZ, 1 FR), eblas ankoraux aligxi kaj prui siajn konojn internaciskale. 3. sabate la 7-a de oktobro ekde la 14-a horo okazos tie renkontigxo kun cxehxaj esperantistoj, kiu estas tradicie gaja kaj agrabla. Kaj ekde la 17-a okazos ekumena Diservo en Esperanto, celebrata de Pastro Kronenberger (DE, katolika) kaj pastoroj Pavel Klimeš (evangelika) kaj Rudolf Němec (husana). Pliaj informoj pri cxuiuj menciitaj arangxoj cxe chrdle@kava-pech.cz

3. Invito al Svitavy

La 7-an de oktobro okazos Esperanto-arangxo ankaux en Svitavy. La renkontigxo okazos inter 8:30 kaj 9:00 cxe la stacidomo ČD.

Antaŭtagmeze estas promeno tra la urbo kun klarigaj vortoj de urba historiisto kaj posttagmeze video pri vizito de K. Janík en Panamo kaj Kolumbio kaj aliaj encxambraj programeroj. Pli da informoj cxe: dvorakoalibuse@quick.cz

4. KAEST - randevuo de fakuloj

Tradicia renkontigxo de fakuloj Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko okazos cxijare inter la 10-a kaj 12-a en České Budějovice. Gxis nun estas en la programo 14 kontribuoj el tre interesaj fakoj. La resumoj de cxiu kontribuoj baldaŭ estos konsulteblaj cxe <http://kava-pech.cz/kaest> Tie vi ankaŭ trovos cxiujn bezonatajn indikojn kaj aligxilojn.

5. Expolingua kaj Esperanto

Dum la tagoj 10.-11.11.2006 okazos en Prago la 16-a Internacia Foiro de Lingvoj, Edukado kaj Kulturo. La unuan fojon dum gxi prezentigxos ankaŭ internacia lingvo Esperanto en la bloko "Lingvaj minikursoj" vendrede ekde la 14-a horo. Pliaj informoj pri Expolingua cxe: <http://www.expolingua.cz/index.php?id=24>

6. Alvoko al la organizantoj de E-eventoj

Karaj organizantoj de Esperanto-eventoj, ni tre volonte informos en CxEA-retkomunikoj ankaŭ pri viaj arangxoj, sed ni devas pri ili scii. Baldaŭ ni dissendos la kalendaron por la venonta jaro. Por ke gxi estu kompleta, bv. sendi bazajn informojn al la retadreso chrdle@kava-pech.cz